

Ino Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 205 (2018:1)

Jan – Mar 2018



**Feminismo
kaj mi**

**Lingvoj konstruitaj
de virinoj**

*Babilado kun...
Néia Lúcia*



53-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

38-a Brazila Esperantista
Junulara Kongreso

informoj: bke2018.wordpress.com

ALOJAMENTO COLETIVO

bit.ly/alojamentobke

Local: Hostel Bosque de Iohana

R\$30/dia (jovens)
R\$45/dia (adultos)

*café da manhã incluso



Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio
Eperantista de Rio-de-Ĵanejro

N-o 205 (2018:1)

Jan - Mar 2018

77-a jarkolekto

Redaktas kaj aranĝas: Allan Argolo

Revizias: Marcionilo Vasconcelos

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Anna Lobo, Dirce Sales,
Karina Oliveira, Lilia Ledon,
Manuela Burghilea, Nazaré Laroca
kaj Néia Lúcia Souza.

Kovrilo:

Bildo de nekonata aŭtoro.


La redaktanto ne respondecas pri la
subskribitaj artikoloj kaj la opinioj
ĉi-tie esprimitaj ne nepre spegulas
la opinion de AERĴ.




Associação Esperantista do
Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296

disvastigo.aerj@gmail.com 

www.aerj.org.br 

facebook.com/aerj.esperanto 

youtube.com/user/TVaerj 

Estraro

Prezidanto: Márcio Santos Nascimento

Vic-prezidanto: Allan Argolo

Financa Direktoro: Aristides Pereira

Sekretario: Tamiris Queiroz

Direktoro pri Disvastigado: Matheus Arantes

Direktoro pri Instruado: Vitor Mendes

Fiska Konsilantaro

Rosana Caraméz, Sédio Langone,
Terezinha dos Santos kaj Gastão Casper.

Enhavo

| | |
|--|----|
| El la Redakcio _____ | 4 |
| <i>Babilado kun...</i> Néia Lúcia Souza _____ | 5 |
| Kovrilo: Feminismo kaj mi (Karina Oliveira) _____ | 8 |
| Kio venas post libereco? (Anna Lobo) _____ | 10 |
| FORTOJ el perfortoj kaj malfortoj (Lilia Ledon) _____ | 12 |
| Al pli bona estonteco (Lidja Zamenhof) _____ | 13 |
| Lingvoj konstruitaj de virinoj (Manuela Burghilea) _____ | 15 |
| Poezia Angulo: Marjorie Boulton (Nazaré Laroca) _____ | 18 |
| Omaĝo al Maria (Dirce Sales) _____ | 22 |

Kara leganto,

Jes, vi bone legas; kaj ne, la nomo de nia revueto ne ŝanĝiĝis. Tamen, konstateblas el la ĉi-eldona kovrilo ke antaŭ vi estas speciala n-ro de *Rio Esperantista*.

Ni ĉiuj konscias ke, almenaŭ en nia brazila esperanto-movado, la plejmulto konsistas el viroj. Do, en tiu monato kiam oni festas la Internacian Tagon de Virinoj, ni pripensis kiamaniere levi la virinan temon en nia komunumo kaj registri sinceran kaj utilan omaĝon al ili. Laŭ humila provo de la nuna redakcio, la respondo estas: donu voĉon al ili!

Tial, en tiu ĉi n-ro de *RE* vi nur trovos tekstojn el plumoj de virinoj pri pluraj temoj. Komence, legeblas intervjuo kun Néia Lúcia Souza, respondeculo pri Biblioteko Carlos Domingues. Sekvas interesaj artikoloj de Karina Oliveira kaj Anna Lobo pri feminismo, pensiga kaj profunda teksto de Lilia Ledon pri subpremado kaj poste legeblas ero de la parolado de Lidja Zamenhof antaŭ la Internacia Konferenco de Virinoj (Vieno,

1936), kiam ŝi elparolis la vaste diskutitan frazon “Ĉion, kion volas la virinoj, estas egaleco”.

Ĉu virinoj estas kreemaj? Per tiu demando Manuela Burghilea ekrakontas al ni pri lingvoj konstruitaj de virinoj. En la Poezia Angulo, Nazaré Laroca omaĝas al Marjorie Boulton kaj laste, sed ne balaste, Dirce Sales omaĝas al Maria el Nazareto.

Alia novaĵo enkondukita ĉi-numere estas la sekcio *Reagoj*, kiun ni inaŭguras per respondo de profesoro Reginaldo Prandi al *RE* 204. Ne hezitu reagi, por ke via respondo aperu en la venonta *RE*!

Fine, ni kore dankas al nia amiko Marcionilo Vasconcelos, kiu akceptis la taskon revizii la tekstojn.

Nu, tuj rapidu al legado!

Allan Argolo



Reagoj

É uma honra ver um trabalho meu publicado em esperanto. Aprendi esperanto quando jovem com Maria Rosa De Angelis, em Potirendaba, SP. Ainda hoje sou capaz de ler, de modo que adorei a tradução. Foi uma grata surpresa de fim de ano. Mi dankas pro la iniciato kaj deziras al Vi feliĉan kaj prosperan novan jaron. Abraço,

Reginaldo Prandi — brazila sociologo, profesoro kaj verkisto, pri la teksto *Jen estis Inventita la Kandombleo* (RE 204).



La nomo Néia Lúcia estas forte ligita nuntempe en la esperanto-movado al la Biblioteko Carlos Domingues, la biblioteko de Brazila Esperanto-Ligo. Tamen, ni iomete babilis kun tiu nekredebla virino por scii iom pli pri ŝia vivo kaj pri kiel ŝi rigardas la mondon kaj la rolon de virinoj en la socio. Jen la rezulto:



Rio Esperantista: Néia, rakontu al ni kiu vi estas kaj kiel (aŭ kial) vi esperantistiĝis.

Néia Lúcia: Néia Lúcia Souza, 10/09/1955, Jataí – Gojaso. Mi estis infano kiam familianoj interesiĝis pri Esperanto – mia onklino, kiu ĝis hodiaŭ, 95-jaraĝa, esperantumas, mia patro kaj iliaj kuzino.* Ili studis Esperanton per kurso de Rádio Mundial (RJ) kaj poste faris la Perkorespondan Ekzamenon de Brazila Esperanto-Ligo. Mi havis la ŝancon kunvivi, en tiu etoso, kun kelkaj lernolibroj, vortaroj, kaj ĉefe kvanto da leteroj kaj bildkartoj el pluraj partoj de la mondo – senditaj de la korespondantoj de miaj familianoj.

RE: Vi sufiĉe june diplomiĝis pri bibliotekscienco kaj poste eklaboris malproksime de via devenloko. Kiajn defiojn vi alfrontis? Ĉu ili estis pli grandaj aŭ pli malfacilaj pro tio ke vi estas virino?

NL: Mi translokiĝis al Braziljo en 1976, kiam mi sukcesis en la abiturienta ekzameno de Universitato de Braziljo – UnB, por la kurso Bibliotekscienco. Monmanko estis pli grava ol

esti virino por mi. Mi laboris en mia fako en Braziljo dum pluraj jaroj kaj en 1993 mi translokiĝis – pro farita labor konkurso, al Macapa-AP, kaj sekve mi loĝis en Natal-RN. Ĉiam pro labor kialoj. La defioj estis pluraj. Kiam vi decidas vivi en nekonataj lokoj/urboj, kie vi konas nenium kaj la vivkutimoj estas tre malsimilaj al la ĝisnunaj viaj – helpegas scii ke tie estas almenaŭ unu esperanto-lernanto (kiel okazis en Macapa)! Kaj percepteblas ke multfoje la aferoj estas pli malfacilaj, pro tio ke vi estas virino. En 2000 mi

revenis al Braziljo, kun mia ĵusnaskita filo, Guilherme.

RE: Kion vi pensas pri la rolo de virinoj en la nuna socio? Ĉu vi kredas ke virinoj nuntempe havas pli da spaco ol antaŭe?

NL: Jes, ni havas pli da spaco por virina manifestiĝo. Estas pli da libero por iri-veni kaj elekto-eblecoj ĝenerale. Kaj ne necesas batali en ĉiu momento kiam oni volas decidi ion pri sia vivo mem – batali kun la familio kaj kun la socio. Aliflanke, ankoraŭ estas longa vojo ĝis la kompleta atingo de egalrajteco inter la individuoj.

“ Certe nuntempe estas multe pli da virinoj kiuj aktivis en elstaraj pozicioj ol antaŭ 30 jaroj ”

RE: Kaj pri la esperanto-movado, ĉu vi kredas ke ĝi rekte spegulas la bildon de la ĝenerala socio rilate al virinoj? Ĉu virinaj vocôj estas pli potencaj en esperantujo aŭ ĉu ni esperantistoj estas eĉ pli masklismaj?

NL: Laŭ mia sperto ĝi spegulas la bildon de la ĝenerala socio, almenaŭ en nia lando. Certe nuntempe estas multe pli da virinoj kiuj aktivis en elstaraj pozicioj ol antaŭ 30 jaroj aŭ

pli – sed jen demando: ĉu estas pli da virinoj ol viroj en nia movado? Se jes, ĉu estas egalaj la elstarigado?

“ Volontule labori por Esperanto estis kaj estas la plej riĉiga aspekto en mia vivo ”

RE: Ni scias ke dum via “esperantista kariero” vi ludis gravajn rolojn kaj en la junulara kaj en la plenkreska movado. Kiujn spertojn kaj okazintaĵojn vi trovas indaj konigi al niaj legantoj?

NL: Volontule labori por Esperanto estis kaj estas la plej riĉiga aspekto en mia vivo. Ne eblas menciigi ĉiujn okazintaĵojn kiujn valoris la penon - ĉu la pozitivaj ĉu la negativaj ĉar ĉiuj ili rolis kiel instruistoj por mi.

RE: Pri nia kara Biblioteko, ĉu vi povas ĝenerale prezenti ĝin? Kiom grava vi taksas ĝin kaj kial? Kiuj titoloj estas, laŭ vi, veraj perloj en viaj bretaroj?

NL: Biblioteko Carlos Domingues estas trezorejo de la esperanta kulturo kaj historio. Perloj pluraj! Krom libroj ĝi enhavas revuojn el la komenco de Esperanto, kaj de la brazila movado. Menciindas la kartojn de Zamenhof kaj de Klara Zamenhof en la kolekto de Raraj

Verkoj de nia biblioteko.

RE: Por fini, kiuj estas viaj perspektivoj rilate al virinoj, kaj en esperantujo kaj en la socio ĝenerale?

NL: En esperantujo ke la virinoj sin kapabligu kaj pli kvante kaj kvalite partoprenu en la decidaj kaj plenumaj taskoj. En la socio ĝenerale, mi esperas ke la virinoj trovu la vojon ne plu esti viktimoj de la viroj.

Bretoj de la Biblioteko, portreto de Carlos Domingues kaj Néia dum ekspozicio en Pola Ambasadego



Carlos Domingues

Brazila Esperanto-Ligo

Ekde 2012 la agado de la biblioteko sekvas la celaron planitan en la Programo Amikaro de la Biblioteko.

Programo Amikaro de la Biblioteko - celas kunigi homojn por kontribui por la konservado, kreskigo, disvastigo kaj disponigo de la libro-kolektoj de Biblioteko Carlos Domingues.

En 2013 ni konvertis datumojn de unu sistemo al alia (de Winisis al Openbiblio). Temas pri la plej grava faro dum la jaro.

La sistemon ni prezentis okaze de la 49-a BKE en Florianópolis. La traserĉado oni povas fari laŭ aŭtoro, titolo, fakvorto, ŝlosilvorto kaj voknumero. Alklaku la suban adreson kaj konu la sistemon.

<http://biblioteko.esperanto.org.br/opac/index.php>

Feminismo kaj mi

Karina Oliveira

Kiam mi estis 4-jaraĝa, mi estis kun mia patro kaj mia frato en tre varma loko. Ni estis, tiam, plantante maniokon, ĉar miaj gepatroj tiam laboris kiel terkulturistoj, kaj ni loĝis en tre kampara ejo. Pro tio ke la suno estis forta kaj estis tre varme, mia patro kaj mia frato (kiu, tiam, estis pli malpli 7 jaraĝa) demetis iliajn t-ĉemizojn por esti pli komfortaj kaj freŝaj, kaj mi volis fari la samon. Subite, ili ambaŭ diris ke mi ne povis. “Kial?”, mi demandis, kaj la respondo estis tiu kiu plej ĉagrenas min, kiu plej montras al mi kiom multe mi (ni ĉiuj) devas ankoraŭ ŝanĝi la socion por ke ĉiuj havu egalajn rajtojn: “**ĈAR VI ESTAS VIRINO**”. Tiam, kompreneble, mi simple diris “bone”, sed mi ne vere komprenis kial viroj kaj virinoj estis malsamaj rilate al tio, kaj tiu estas la plej fora memoro kiun mi havas rilate al la konscio ke, iel, la socio agis maljuste rilate al mi pro la simpla fakto ke mi estas virino kaj ne viro.

Dum multaj jaroj mi ne vere atentis pri tiu memoro, sed kiam mi ekkonis la feminisman movadon, dum la fino de mia adoleska aĝo kaj komenco de mia plenkreskula vivo, mi komencis reviziti plurajn memorojn tiajn kaj

kompreni ke mi ĉiam estis feministo, ĉar ĉiam mi vivis tiujn momentojn dum kiuj io ĉagrenis min, dum kiuj mi rimarkis ke io estis erare, sed mi ne bone sciis kion fari aŭ kiel kontraŭbatali tion. La feminisma movado, resume, provas batali kontraŭ la neegaleco kiu estas en la socio rilate al la rajtoj kiujn viroj kaj virinoj havas (kiuj estas malsamaj). Estas pluraj eroj de tiu movado kaj pluraj manieroj agadi per ĝi, kaj ne estas mia intenco ĉi tie ekspliki ilin. Tamen, mi volas emfazi kiom multe da forto la feminisma movado donas al mi dum la ĉiutaga vivo.

Aliaj feministaj virinoj donis al mi la forton agi kontraŭ iu ago aŭ diraĵo kiam mi ne konsentis kun ili. Kelkfoje, la forto venis simple el la fakto ke mi scias ke estas aliaj feministoj, kaj ke mi ne estas sola. Do, feminismo donis al mi forton ne plu zorgi ĉu mia hararo estas bone aranĝita aŭ ne, ne plu zorgi ĉu mia korpo estas “bela” laŭ la socia premo, ne plu rigardi suben se mi trapasas lokon kun multe da viroj kune, sed ja rigardi firme antaŭen, kaj montri ke mi ne timas ilin (kiam oni trapasas iun konstruatan domon surtrate, ekzemple, kaj estas pluraj

laboristoj – viraj – tie). Cetere, feminismo montris al mi, en la teorio kaj en la praktiko, kiel la socio estas maljusta kun virinoj kaj kiel oni pritraktas tion kiel naturan aferon. En la feministaj libroj mi trovis informojn pri kiel virinoj malmulte havas estrajn poziciojn, pri kiel ili estas silentigitaj en pluraj kunvenoj, pri kiel en la kina industrio (inter multaj aliaj) apenaŭ estas virinoj, ktp.

Nur por iom bildigi kiaj estas tiuj situacioj kiuj ĉagrenas min, kaj dum kiuj feminismo donas al mi forton por kompreni la maljustecon kaj batali kontraŭ ĝi, jen kelkaj specifaj vivokazaĵoj kiujn mi trapasis:

- Kiam mi kaj mia eks-edzo estis ĵus translokiĝintaj al nia tiama nova domo, ni ricevis kiel donacon kelkajn purigigajn tukojn por la

kuirejo. La persono kiu donacis ilin specife diris: “jen kelkaj tukoj por ke Karina uzu en la kuirejo”. La implica afero en tio estas ke virinoj havas la devon zorgi pri la domo kaj purigi ĝin, kaj viroj ne vere bezonas fari tion. Feminismo montris al mi ke se du personoj vivas en la domo, la du estu respondecaj pri ĝia purigado! (parolante specife pri paro kun ino kaj malino, sed tio validas por ia ajn paro).

- Antaŭ kelkaj jaroj, la rektoro de mia universitato diris, en oficiala intervjuo al ĵurnalo, ke estas tute natura afero ke virinoj estu malpli nombraj en la sciencaj karieroj, ĉar ili devas havi kaj zorgi pri la infanoj. Ja estas multe pli da viroj ol virinoj en la sciencaj postenoj en



Brazilo, sed la kialo estas ĝuste la ne justeco de la oportunoj kaj la ĝenerala bildo ke viroj estas pli taŭgaj por scienco ol virinoj. Ni ŝanĝu tiun pensmanieron!

- Estas kutima afero, en la publikaj transportejoj, ke viroj sidu kun siaj kruroj tre malfermitaj, kaj prenu la spacon de virino kiu eventuale sidas apude. Lastatempe mi komencis intence ankaŭ preni mian spacon por sidi kaj ne fermi miajn krurojn se mi rimarkas ke la apuda viro estas tute komforta kaj mi devus esti malkomforta pro tio. Mi kutime malforte batas mian kruron en la kruro de la apuda viro, kaj kutime ili orientiĝas kaj rimarkas ke ili prenas multe da spaco por sidi kun la kruroj malfermitaj. Plurfoje

mi jam ricevis malĝojigajn rigardojn el ili, pro tio ke ili kvazaŭ pensas ke mi ne rajtas tion fari, sed mi ne zorgas kaj prenas mian propran spacon por sidi komforte ankaŭ.

Resume, esti feministo por mi signifas konscii ke mi estas traktata per la sociaj reguloj malsame kiel viroj, kaj ke mi povas kaj devas batali por ŝanĝi tion en nia socio. Ekde la senrajto promeni sub la suno sen ĉemizo ĝis la konscio ke mi plej kredeble ricevos malpli altan salajron se mi havos la saman postenon kiun viro havas, feminismo montras al mi ke tiuj neegalaĵoj ekzistas kaj ke mi havas la forton ion fari por ricevi la rajtojn kiujn mi, kiel virino, meritas.

Kio venas post libereco?

Anna Lobo

Subjugado. Perforto. Manko de rajtoj. Malrespekto. Tiuj ĉiuj estas trajtoj kiuj atingas al pluraj minoritataj sferoj de nia socio. En tiu ĉi teksto, mi ĉefe parolos pri la virinoj kaj kiel virino, sed tiuj linioj same povas etendiĝi al la aliaj – kaj certe estos iom da identigo al tio ĉio.

Rigardante la historion, ni vidas ke en pluraj fojoj virinoj estis silentigitaj, sen rajto senti plezuron dum seksumado, nek la rajto

voĉdoni, korsetigitaj kaj inter multaj aliaj aferoj. Hodiaŭ, kelkaj aferoj ankoraŭ ne ŝanĝiĝis, ĉar ankoraŭ okazas pluraj kazoj de perforto, malrespekto, malgranda salajro por sama laboro, kaj tiel plu.

Tamen, jam multe pli bonas. Virinoj gajnas pli kaj pli da spaco kaj voĉo, kaj de tio venas mirinde nekredebla ŝanĝo en nia socio. Sed, ĉu vi demandis al vi mem, kio venas post la libereco? Kiam oni havas pli

da libereco, oni havas pli da respondeco sur siaj agoj kaj diraĵoj. Kiam oni havas pli da povo, tiam tiu trovos pli da respondeco.

Laŭ mi, indas ke ni haltu dum iom da tempo kaj pensu: Kion ni faros kun pli da povo kaj libereco? Ĉu ni uzu tion por subjugi la virojn? Ĉu ni uzu tion por justigi iun ajnan agon nian – “ili ĉiam faris tion, seksumis kun pluraj senzorge kaj inter aliaj aferoj, do nun estas nia vico perfidi kaj fari kion ajn venas al nia kapo”? Ĉu indas iĝi rankoraj, reagemaj kaj ribelemaj?

Kaj, atentu ke, mi ne volas ŝajniĝi ĉi tie ke ni estas defendanto de iu “pudoreco”, nek komprenigi ke la libereco estas malbona, kaj ankaŭ ne ĝeneraligi la sintenojn de viroj kaj virinoj. Mia celo ĉi tie estas pensigi ke indas konsideri kion fari kun tiu libereco kaj povo kiujn ni nun ekhavas. Tiu estas bela oportuno por montri alian manieron agi, montri la alian flankon de la vizaĝo, kaj pli enprofundiĝi en nia “ineco”, eĉ por ke ni povu pli bone vortumi pri tio.

Estas fakto ke viroj kaj virinoj estas tre malsamaj estoj kaj havas malsamajn manierojn funkcii. Kaj aldone al tio, ankaŭ troviĝas la diverseco inter tiuj du flankoj, kio vere povus iĝi alia teksto. Sed por nun, mi prenu la arketipon aŭ ideon

de virino kaj viro. Jes, ekzakte tiu koncepto de Jung pri iu praa imago aŭ ideo de la aferoj, kiuj iĝas pli malpli universalaj – Viraj trajtoj kiel la suno, agemo, esploro, raciemo kaj virinaj trajtoj kiel la luno, enemy kaj sentemo.

Tiel, indas ke ambaŭ flanke apogante unu la alian, je siaj karakteroj kaj, per tiu kunlaborado kaj apogado fari kun ke tiu cirklo ĝiru – Io kiel la japana simbolo de *ying* kaj *yang*. Ankoraŭ pli profunde, mi ŝatas pensi pri la personoj trans la ŝildo, virino kaj viro. Ke ĉiu sukcesu harmoniigi ĉi tiujn flankojn ene de si mem, por ke tiu harmonio aperu ekstere. Kaj nepre ne forgesi ke - Ni ĉiuj estas en tiu ĉi granda planedo, lernante la plej gravan trajton, kiu fine elsavos nin kaj nin ligos – AMO.



FORTOJ el perfortoj kaj malfortoj aŭ De Solaj Eroj al Solidaro/Solida Aro aŭ Transcenda Potenco de Subpremeo

Lilia Ledon

*Al tiuj kiuj neniam sentas sin
pli liberaj, en kosmo-aparteno,
ol inter la muroj
de la de ni starigita
mondo-prizono*

Larĝasence arto ĉieas kaj kulminas antaŭ okuloj pli “poeziemaj” ol “prozecaj”. Gutoĉenoj sur aranereto interpreteblas kiel artaĵo... kies aŭtoroj multos: la naturo kun siaj elementoj, la specifa teksisto, la sentemo-grado de la spektanta homo... Se temas pri fotist(in)o aŭ pentrist(in)o aŭ verkemul(in)o plua kreaĵo ŝprucos. Ĉi tiu amatoraĵo aŭ profesiaĵo estos vaste diskonigita aŭ tute ne, surmerkatigoŝos aŭ ne, eble eniros la artoborsojn kaj la Arto-Historion.

Taksi iun “artisto” ligoŝas al senfinaj kulturaj kaj sociaj, politikaj kaj ekonomikaj, psikologiaj kaj personaj faktoroj, normoj, antaŭjuĝoj. Sangas mia menso kiam mi konstatas, ke ul(in)o neglektita de ĉiuj dum la tuta vivo kaj kiu nur sukcesis supervivadi apogante sin sur la energio de sia spontanea kreivo

ĉeestas en listoj de la Grandaj Kreintoj de la Homaro, kies rolo estas ĉefe nutri homaran orgojlon pri si mem — sed ne pri nefamuloj el la ĉirkaŭaĵo.

Ĉiuj tamen vivas. Esploru ies internaĵon kiom eble plej profunde kaj, poste, laŭdante ties kreaĵojn, vi faros omaĝon tute simple al la Vivo-Fortoj mem, kiujn neniu el ni kontrolas kaj pri kiuj ni devus almenaŭ, eĉ se kriples, konscii. Respektemo absoluta estiĝus, ni ekkundividus la nekompreneblan kaj ĉieestantan ekzistadon de la naturo, de la araneo kaj sia reto, de ties vido/sento kaj iliaj eventualaj kreo-devenaĵoj.

Iuj sisteme mortigas “aĉajn” araneojn kun konsekvencoj por la naturo, do ankaŭ por nia sento/estado/farado homa(ra). Same, iuj, pro timo maskovestita kiel supereco

kaj povo, ŝtonumas, perfortas, silentigas, neglektas, inter aliaj, inojn, en speco de instinkta sindefendo pere de agresemo. Ni estas animaloj, tio evidentiĝas en niaj sistemoj. Arbitra trouzo de forto signas minimume senkonscion, kiu glitas al senkonscienco.

Jen konsiderinda atuto ĉe virinoj kaj ceteraj subprematoj multspecaj: ili “malfortas”, do, eĉ se kripole, konscias, konsciencas; do emas al absoluta respekto kaj dum ili supervivas, uzas laŭ siaj naturaj kapabloj rimedojn kiuj honoras la vivon: arton, amon, esperanton...



Memportreto kun kolringo el dornoj kaj kolibro
Frida Kahlo, 1940.

Al pli bona estonteco

Ero de la parolado de Lidja Zamenhof
antaŭ la Internacia Konferenco de Virinoj, Vieno 1936.

Dum jarcentoj kaj jarmiloj la virinoj elportadis la jugon de la vira regado. Ili permesis konsideri sin kiel pupojn kaj ofte ili estis pupoj. Sed tion la viroj ne rajtas riproĉi. La virinoj ja estis tiaj, kiaj la viroj volis ilin havi. Sed ĉio devas havi sian finon. Tro maldolĉaj iĝis fine la fruktoj de la vira regado, por ke ni elportu ilin plu sen murmuro, por ke ni pensu nur pri tio, kiel plaĉi al la sinjoro, kiel konkeri kaj konservi ilian moŝtan favoron. Tro maldolĉaj iĝis la fruktoj - kaj tiun amarecon ni, virinoj, sentas pli akre ol la viroj.

Kiam mankas pano en la familio, kiu pli suferas pro la malsato de la infanoj: ĉu la patro aŭ la patrino? Kies koro pli tordiĝas je la vido de la kaviĝintaj vangoj kaj malsataj buŝetoj: ĉu la koro de l' patro aŭ tiu de la patrino? Kaj kiam militvoko audiĝas tra la mondo, kiu pli tremas kaj pli doloras pro la filoj, sendotaj al la bataloj: ĉu la patro aŭ la patrino? Kaj kiam ne venas plu sciigoj el la tranĉeoj, kiam revenas ĉiuj krom la filo, kies koro pli sangas? Klare estas: la militmonstro kaj la ĝin longe, longe sekvanta ombro de egale




monstra krizo enigis siajn ungegojn ĉefe en la virinajn korojn - kaj tiuj suferoj devas fine ekskui, rompi kaj venki la longan subiĝemon de la virinoj. La virinoj devas leviĝi - ili volas leviĝi - ili leviĝas! Ili ne leviĝas, por faligi la virojn. Ili ne leviĝas, por elŝiri komplete el iliaj manoj la sceptron de la regado kaj kapti kun ekskluziveco la kondu-kilojn de la mondo. Tion celas neniuj, eĉ ne plej fa natika feministino. Ĉio, kion volas la virinoj, estas egaleco!

“La homaro estas kiel birdo kun du flugiloj” diris 'Abdu'l - Bahá. Unu flugilo estas la viraro, la alia - la virinaro. Antaŭ ol ambaŭ flugiloj estos egale fortaj kaj disvolvitaj, la birdo ne povas flugi.

Kaj tiu dua, ĝis nun malforta flugilo, iom post iom fortiĝas. La virinoj penetras en ĉiujn profesiojn kaj plenumas ilin egale bone kiel la viroj. Hodiaŭ malaperas pli kaj pli la plorinda tipo de pup-virino, edukata nur por trovi edzon kaj el sub la patra regado pasi en la regadon de la edzo,

sia nova estro kaj prizorganto. Disvastiĝas pli kaj pli la tipo de virino sendependa, vivkapabla, akiranta mem sian panon. La vojo de la progreso estas ofte dorna. Tiujn virinojn oni komence traktis devas fine suspekto. La fido al la virina laboro ankoraŭ nun ne tute ĝeneraliĝis kaj tiu fidmanko, kun la restanta ekspluatemo kaŭzas, ke ofte por laboro samkvanta kaj samkvalita virino ricevas duonon aŭ trionon de la pago, donata al viro. Sed tio estas la malfacilaĵoj de la transira periodo. Kiam tiu periodo estos finita la virino ekonomie estos egala al viro.

*El Por ke la tagoj de
la homaro estu pli lumaj.
p. 192-193*



*Por ke la tagoj de la
homaro estu pli lumaj
J. Amouroux (kompil.)
FEL, Belgio, 2008.*


Lingvoj konstruitaj de virinoj

Manuela Burghilea

Ĉu virinoj estas lingvokreemaj? Kun la nova ondo en la Interreto aperis societo de kreantoj de lingvoj, la tiel nomataj *conlangers*. Sendube, la plejmulto el ili estas viroj, tamen indas menciigi ke la lingvokreado komenciĝis kun virino, en la 12a jarcento, kaj ŝi ne estis la nura ino tra la historio kiu aŭdacis proponi propran lingvon... Ni analizu kelkajn el ili.

La plej malnova priskribita konstruita lingvo estas *Lingua Ignota* (Nekonata lingvo), kiu estas revelacia lingvo priskribita de la abatino Hildegard de Bingen (1098-1179). Temas pri vario de la latina lingvo kun pruntvortoj el nekonataj lingvoj. *Lingua Ignota* posedas propran skribon. La alfabeto enhavas 23 literojn, la *litterae ignotae* (nekonataj literoj). La Nekonata lingvo ne estas aŭtonoma lingvo kaj ne priskribas kompletan sistemon, ĝi proponas nur glosaron kaj celas simpligi la latinan. La abatino ne instigis aliajn personojn uzi sian lingvon. La agado de Hildegard de Bingen ne limiĝis al la lingvo-inventado, ŝi ankaŭ spertis pri naturscienco, kuracado, muziko, filozofio kaj verkado.


Multaj lingvemuloj aŭdis pri *Interlingua*, malmultaj tamen scias ke ĝi ŝuldas multe al virino... En 1924, la usonanino Alice Vanderbilt Morris, membro de fama nederland-devena familio, fondis kune kun ŝia edzo IALA - Asocio por la internacia helpanta lingvo. *Interlingua* estis prezentata al la publiko en 1951, unu jaro post la morto de Alice Vanderbilt Morris, kaj montris la rezultojn de pli ol du jardekoj de lingvistikaj studoj. *Interlingua* estas naturalisma planlingvo, frukto de longa kunlabora lingvistika esloro. Ĝi uzas internaciajn vortojn elprenitajn el la angla, la franca, la hispana, la itala kaj la portugala. Vorto estas adoptata en *Interlingua* se ĝi estas komuna en almenaŭ tri el tiuj lingvoj.




La 23 nekonataj literoj de Hildegard

Teonaht estas arta lingvo kreita de la usona profesorino Sarah Higley, kies plumnomo estas Sally Caves. La kreantino komencis elpensi la lingvon en 1962, kiam ŝi estis 9-jaraĝa, por fikcia raso de katoj nomataj feleonimoj. En ŝia fikcia verko, la Teonimoj iĝis poste homoj kiuj havas katajn diaĵojn kaj loĝas en la Nigra Maro. Dum la evoluigo de la lingvo, Sarah Higley interesiĝis al diversaj lingvoj: hispana, franca, germana, malnova angla, latina, malnova irlanda, hebrea, eŭska. La vortordo estas OSV. Ekzistas du skribmanieroj, per latinaj leteroj aŭ per Teonahta alfabeto. Oni povas forpreni la sufiksojn kaj prefiksigi ilin al la vortoj. Pluraj receptoj en Teonaht disponeblas rete, kun indikoj rilate al la manĝkutimoj de la Teonahtanoj. En 2002, Glebo Malica, de la *esperantokora* punka muzikgrupo *Piĉismo*, registris kompaktan diskon en 33 planlingvojn, inter kiuj Teonaht, parolante pri la historio de la Babela turo.

En 1975, Staren Fetcey komencis krei la lingvon *Kotava*. Bazita sur la principo de kultura neutraleco, *Kotava* estas internacia helplingvo kaj havas la sloganon “projekto humanisma kaj universala, utopia kaj realisma”. Oni taksas ke ĝi havas proksimume 40 parolantojn, ĉefe en Francio, Hispanio, Kanado, Rusio kaj Afriko. La baza vortaro enhavas nuntempe pli ol 29.000 radikojn kaj la lingvaj evoluoj estas kontrolataj de speciala komitato. Ekzistas centoj de tradukoj de universalaj verkoj al la *Kotava*. La lingvo estas tute regula, ne havas deklinaciojn kaj morfologiajn genrojn, kaj ĝia sintakso estas libera.



Supre: La literoj de *Teonaht*
 Sube: *Native Tongue (Denaska Lingvo)*, libro de S. H. Elgin kie prezentigas la feminisma lingvo *Láadan*




Kēlen estas lingvo konstruita en 1980 de Sylvia Sotomayor, kies eco estas la manko de verboj. La kreantino konscie perfortas tiun lingvistikan universalon kiu postulas ke ĉiuj homaj lingvoj posedas verbon. Anstataŭ tio, ŝi uzas rilatvortojn - de ekzistenco, de ŝanĝo, de transakcio kaj de tuto-parto. *Kēlen* estas lingvo de eksterteranoj, la Kelenoj. Sotomayor detale priskribis la Kelenan kulturon, parencecon kaj societon, ĝia kalendaro kaj superstiĉoj. Ŝi gajnis la premion Smiley Award en 2009, en konferenco pri lingva kreado, por la arta dimensio de la keleno.

Láadan estas feminisma artefarita lingvo kiu datas de 1982 kaj kiu estas priskribata de Suzette Haden Elgin en ŝia sciencfikcia romano *Denaska Lingvo*. En tiu romano, nordamerikaj virinoj perdis iliajn civilajn rajtojn kaj ili planas renversi la patriarkecon kreante novan lingvon kiu esprimu iliajn virinajn perceptojn kaj travivaĵojn. Ĝi estas influencita de la angla kaj de la navaj (indiĝena nordamerikana lingvo). *Láadan* estas tona lingvo, havas VSO ordon, ne posedas artikolon kaj funkcias per partikuloj (por deklaro, ordono, demando, promeso, evidenteco, inter aliaj). La vortaro enhavas termojn por specifaj tipoj de menstruo, por ‘ne-ferioj’ (teorie feria tempo sed fakte tre ŝarĝita, ekzemple en festoj kun multaj gastoj el kiuj neniu helpas en la preparoj), aŭ specifa vorto por sindeteno demandi kiam estas evidenta ke la interparolanto fervore volas esti demandata pri io.

La *Tera Lingvo* estas gestlingvo inventita de Yoshiko McFarland en 1988. Ĝi funkcias per 91 simboloj aŭ mangestoj, kiuj estas fundamentaj ideogramoj. La simboloj havas geometrian formon, numeron, mangeston, nomon (laŭvoĉan) kaj binaran kodon. La vida komunikado estas la plej kutima



Hildegard de Bingen
Lingua Ignota



Alice V. Morris
Interlingua



Sarah Hingley
Tetrah



S. Sotomayor
Kēlen

komunikmaniero, tamen la lingvo povas esti ankaŭ parolata pere de la voĉaj nomoj asociitaj al la simboloj. La vorta ordo estas libera. Tiu sistemo kunigas plurajn komunikmodojn de la homaro, entenante fizikajn kaj sociajn minoritatojn, kaj baziĝas sur ĝia ena natureco.

Ilaini estas la lingvo de la fikcia lando Valdyas, kreita de Irina Rempt antaŭ ĉirkaŭ du jardekoj. “*Ilaini*” signifas “la lingvoj”, ĉar pluraj lingvoj kaj dialektoj ekzistas en tiu lando. La lingvo posedas propran alfabeton. *Ilaini* havas naŭ kazojn kaj ne distingas inter nomoj kaj adjektivoj. En la antikvaj versioj ĝi havis prepoziciojn, sed nuntempe la tendenco estas uzi postpoziciojn. La ekzemplaj tekstoj pronopitaj de la kreantino inkluzivas poemojn, rezepojn, preĝojn, leĝojn kaj fabelojn de la fikcia popolo de

Valdyas.

Tokipono estis konstruita de la esperantistino Sonja Lang kaj unue publikigita en la interreto en 2001. La nomo de la lingvo estas derivata de la piĝina vorto “tok” kaj de la Esperanta adjektivo “bona”. Laŭ la principo de la simpleco, ĝi ne havas kazojn, genrojn, deklinaciojn aŭ konjugaciojn, kaj preferas mallongajn frazojn. *Tokipono* kontentiĝas kun baza vortostoko de nur 123 vortoj kaj havas nur kvin bazajn numeralojn. La lingvo distingas radikvorte ankaŭ nur 5 kolorojn: *walo* (blanka), *pimeja* (nigra), *loje* (ruĝa), *laso* (blua), *jelo* (flava). Oni esprimas aliajn kolorojn per kunmetaj sintagmoj: *laso jelo* = flavblua, verda.

Por pli da konstruitaj lingvoj, konsultu la [Konlang-atlason](#) kaj malkovru Nevashi, Dothraki, Asha'ille, Merechi...



Marjorie Boulton

Maria Nazaré Laroca

La plej eminenta kaj famkonata Poeto el Esperantujo, D-rino Marjorie Boulton, angla verkistino, naskiĝis la 7-an de majo 1924 kaj la 30-an de aŭgusto 2017 ŝi forpasis.

Poeto, novelisto, dramverkisto, eseisto, tradukisto, biografiisto, kandidato por Nobel-premio pri literaturo proponita de la Esperanta PEN-centro en 2008, ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto, honora membro de UEA kaj prezidanto de la esperanta kat-amikara asocio Rondo-Kato.

Profesie ŝi estis instruistino kaj ŝi doktoriĝis pri literaturo ĉe la Universitato de Oksfordo en 1976.

La verkado de Marjorie Boulton – kaj angle kaj Esperante – plenas je ideala humanismo. Ŝia emocia poemaro prezentas (foje per eleganta humuro) la turmentojn kaj pasiojn de virina animo.


Jen bela penso ŝia:

Ŝajnas ke, dum mi serĉas mian propran plej realan memon, mi duonkonscie serĉas ion, kio estos valida por ĉiuj homoj.

(El **Eroj kaj aliaj poemoj** (*Enkonduko*). J. Régulo-Eldonisto- La Laguna - Kanariaj Insuloj. 1959. pĝ.12)

Menciindas ŝiaj poemaroj *Kontralte* (1955), *Cent ĝojkantoj* (1957) kaj *Eroj kaj aliaj poemoj* (1959). Indas ankaŭ memori pri ŝia belega biografio de *Zamenhof* (1962).

Ŝiaj versoj estas lumoj, kiuj plene fontas el ŝia triopa lirika memo. Ni plukas kelkajn poeziajn florojn el ŝia verkaro por via ĝuo:



Triopa Memo

Mi estas tri. La digna lektorino
kun krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
de l' dramo primitiva ŝi prelegas.

Dume, en koro, primitiva dramo
okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir' tortura.

La lektorino pensas.

La virino baraktas, krias, nur angoron sentas.

Sed la Poet', per arta disciplino,
observas ilin ambaŭ, kaj komentas.

La katido dormas

Sen scivolemo kaj sen apetito,
sur la kanap' li rondas.

Nur la fluida flank' silente ondas;
sen li la brua, skua mondo mondas.

Li kaŝas la vizaĝon, faras sian
propran mallumon, cirklon senpasion;

li estas io strange absoluta;
li estas surda, blinda, milde muta,
fermita cirkvito.

Feliĉe

*Floro de krizantemo:
neniam tro maljunas ni por amo –
brakoj maturaj spertas pri alpremo!*

*Flor' de cejano...
sed kiel dolĉa, en la vivbezono,
estas nur premo de amika mano!*

La dolĉa poezia voĉo de Boulton restos por ĉiam en nia koro. Poetoj neniam mortas: ili ensorĉiĝas por nia feliĉo.

Poemeto omaĝe al Marjorie Boulton

*Marjorie Boulton: poetin' multobla,
nia plej brila stelo el poezio,
virino homama, nin adiaŭas,
kaj l' esperanta mond' sopiras orfa.*

*Tamen Parnaso glori al ŝi festas;
gaje dancantaj muzoj ŝin akceptas,
kaj al ŝi regalas per donac' unika:
bunta bukedo da poemoj ŝiaj,
kiuj iĝis vivantaj floroj lumaj.*

El: <http://nazarelaroca.blogspot.com.br/2017/08/poemeto-por-marjorie-boulton.html>

Omaĝo al Maria

Dirce Sales

La okan de marto, en pluraj partoj de la mondo oni festenas la sendependencon, de tiuj estuloj tre gravaj kaj valoraj por la homa socio: la virinoj.

Do per artikoloj, specialaj premioj, televidprogramoj, ktp, oni omaĝas la virinojn kiuj sin dediĉas al Scienco, Edukado, Sporto, Artoj, Medicino, inter aliaj; tiel kontribuante por la evoluado de la vivo.

Sed mi volus registri tie ĉi etan omaĝon al iu virino, kies tenero, mildeco kaj sindediĉo restus por ĉiam en la koro de l' tuta homaro: Maria el Nazareto.

Maria, kiu sen standardoj aŭ titoloj, brakumis la gravan mision: ricevi kiel filon, iu kiu apartigus la homan historion en du eraoj, kies alveno en la Tero modifus la kredojn, la sintenon de la popoloj: Jesuo, la Kristo.


Cetere, Ŝi, anime kunportis la

rimedon plej gravan kaj necesan al ĉiuj ni: la Amon!

Ŝi, kiu sen postuloj aŭ plendoj sindediĉis al la edukado de tiu amata kaj bonkora filo, kies sorto, pro la egoismo kaj intereso de la suverenaj sinjoroj, estis senkompate mortinta, kaŭzante la plej kruelan doloron al la patrina koro, kiu ne povis kompreni la kialon de perforto tia al iu, kiu nur bonfaron donacis kaj faris al la proksimulo...

Sed ŝia amkapablo estis tiel granda, ke eĉ antaŭ la tragedia momento, kiu certe neniu patrino deziras sperti, ŝi, kunigis la pecojn de sia koro kaj adoptis, kiel filojn de sia animo, la tutan homaron, personigita je Johano, plenumante, tiamaniere, la peton farita de Jesuo al ŝi dum la momento de lia morto.

Al Maria, nia Ĉiela Patrino, mia kora kaj humila omaĝo, en la Internacia tago de la virinoj.



XX **Treinamento de Instrutores de Esperanto**

Instruado de Esperanto sen la kaĝo de la gramatiko por infanoj kaj gejunuloj

**Produção de material didático:
jogando a gramática fora**

Fernando Pita

**Projeto Identidade:
introdução do idioma a partir do Eu**

Dirce Sales

Ĉu gramatika aŭ paroliga instruado?

Altamiro Rocha

**Introdução à abordagem comunicativa
no ensino de línguas**
Victor Hugo

**Ludinstruado: uzo de materialoj
por la esperantumado**

Marilza Silva

7 de abril de 2018, das 8h30 às 17h

Local: Kultura Kooperativo de Esperantistoj

Av. 13 de Maio, 47, Sobreloja 208, Centro, Rio de Janeiro

Inscrição: Sócios AERJ/KKE: R\$10,00

Não-sócios: R\$20,00

Organização:



Associação Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni, 135/302 - Centro, Rio de Janeiro
www.aerj.org.br | disvastigo.aerj@gmail.com

Apoio:



Cooperativa Cultural dos Esperantistas
Av. 13 de Maio, 47, s/l 208 - Centro, Rio de Janeiro
(21) 2544-4314 | esperanto.kke@gmail.com

29^a Ŝtata Esperanto-Renkontiĝo de Rio-de-Janeiro

Petrópolis | sabato, 19^a de majo 2018

Esperanto en Lokoj de Kulturo

Renkontejo

Casa da Cidadania
R. Visconde de Souza Franco, 474 - Centro

Informoj kaj Aliĝoj

disvastigo.aerj@gmail.com

Organizaĵo:



Associação Esperantista do Rio de Janeiro
Rua Teófilo Otoni 135/302 — Centro, RJ
(21) 2467-4296 | disvastigo.aerj@gmail.com

Apoio:

